# HEROLDO DE UTENA

Informilo de BET- 49, 10-07-2013, merkredo N-ro 5

## PREZIDENTINO SUMOS LA SERVADON



Amaskomunikila servo de Prezidentejo la 8-an de julio ( lundo) sciigis pri okazonta amaskomunikila konferenco kiun prezentos Prezidentino de Litova Respubliko Dalia GRYBAUSKAITĖ. La konferenco okazos la 10-an de julio (merkrede). La landa gvidanto revuos kvarjarajn rezultojn de sia servoperiodo, la plej gravaijn ŝanĝiĝojn kaj la gravajn labortaskojn. La Prezidentino respondos al demandoj de ĵurnalistoj. La konferencon senpere aŭdvidigos Litova Televido, ankaŭ la prezidenteja intereto www.prezidentas.lt

## ETAPO DE POLITIKA SEZONO

Sian porĵurnalistan konferencon la 9-an de julio (marde) organizas Litova Registaro. La je 11-a en la Blanka salono okazos amaskomunikila konferenco de litova Premiero **Algirdas Butkevičius** titolita „La politika sezono finiĝas per starto al la respondeca misio prezidi Konsilion de Eŭropa Unio. En la konferenco la premjero priparolos aktualaĵojn de finiĝanta politika sezono, prepariĝo por la nova politika sezono kaj prezidado de la Eŭropa Konsilio.

La Registaro invitas reprezentantojn de amaskomunikilaro.

## LA PROGRAMO por la 10-a de julio (merkredo)

### Ekskursa tago

| | |
|---|---|
| **7.00-8.00** | Matenmanĝo por ekskursantoj |
| **8.00–9.00** | Matenmanĝo por restantoj |
| **8.00-22.00** | **Ekskurso tra nordorienta Litovio** |
| **9.00-11.00** | Libera tempo |
| **11.00-12.30** | Lernado de Esperanto-kantoj |
| **13.00–14.00** | Tagmanĝo |
| **14.00–20.00** | Libera tempo |
| **20.00-22.00** | Publika koncerto sur subĉiela scenejo ĉe la urba lago *Dauniškis*. Koncertas Emanuele Rovere, kontribuas ankaŭ aliaj Esperanto-kantistoj |

## LA PROGRAMO por la 11-a de julio (ĵaŭdo)

| | |
|---|---|
| **8.00 – 9.00** | Matenmanĝo |
| **9.00 – 11.00** | Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj |
| **10.00 – 11.00** | Somera universitato. Petras Čeliauskas: "Dorna vojo de la litova lingvo" (aŭd. n-ro 2-08) |
| **11.00 – 12.00** | Somera universitato. Aleksander Korĵenkov: "Historio de Esperanto", prelego 4 (aŭd. n-ro 2-16) |
| **12.00 – 13.00** | Somera universitato. Tõnu Hirsik: "El kio konsistas niaj manĝaĵoj" (aŭd. n-ro 2-08) |
| **13.00 – 14.00** | Tagmanĝo |
| **14.00 – 15.00** | Aŭtora horo de Mikaelo Bronŝtejn kun prezentado de freŝeldonitaj libroj kaj la plej novaj kantoj (aŭd. n-ro 2-16) |
| **15.00 – 16.00** | Somera universitato. Anna Striganova: "Lingvo de fabeloj" (aŭd. n-ro 2-08) |
| **16.00 – 17.00** | Somera universitato. Stano Maček "Krucenigmoj en Esperanto" (aŭd. n-ro 2-16) |
| **17.00 – 18.00** | Somera universitato. Halina Gorecka: "Astana – la plej juna ĉefurbo" (aŭd. n-ro 2-08) |
| **20.00 – 21.00** | Koncerto de la ensemblo "Utauta" (Muzika lernejo) |


## PLELEGANTOJ KAJ AŬSKULTANTOJ



*Petras Čeliauskas*



*En prelego pri la  litova lingvo*




*Aleksander Korĵenkov*



*Pri historio kaj La Ondo*

## NI KANTU EN ESPERANTO !

### Mi ne ekparolus
(Būčiau nekalbėjus)
Litova popola kanto

Mi ne ekparolus,
Ne parolus. Ne! (2x2)
Estis belaj la okuloj –
Mi tentiĝis.   (2x2)

Mi ja ne promenus,
Ne promenus. Ne!
Hele brilis la plenluno –
Mi tentiĝis.

Mi ne drinkus tute,
Jes, ne drinkus. Ne!
Estis plena la pokalo –
Mi tentiĝis.

Mi ne kisus tute,
Jes, ne kisus. Ne!
Estis dolĉaj liaj lipoj –
Mi tentiĝis.

Mi ne dancus tute,
Jes, ne dancus. Ne!
Skue ludis la muziko –
Mi tentiĝis.

Mi ja ne kuŝiĝus,
Ne kuŝiĝus. Ne!
Estis mola la litaĵo –
Mi tentiĝis.

### Venos mi
(Ateisiu, mergužėle ateisiu)
Litova popola kanto

Venos mi, fraŭlineto, venos mi.
Venos mi post subiro de la sun`.
Vi atendu mian venon
En la ruta florĝardeno
Venos mi post subiro de la sun`.

Ĝis la ven` amokanton kantu vi.
Ĝis la ven` florkolektu en garden`
Por ke nokto vin ne tedu
Kaj soleco ne obsedu
Ĝis la ven` amokanton kantu vi.

Kanton ĉi antaŭ longe scias mi.
Ofte mi ĝuis de la melodi`.
Ekde nun ni kantu kune
Tra la nokto hela lune.
Belas nun – lante malaperas sun`.

Sole ni sciu pri la nokto ĉi.
Sole ni sciu pri la nokto ĉi,
Kiel eksilentis kantoj
Kaj ekdormis geamantoj
Belas nun – ĉe l` aŭror vekigas sun`

*La kantojn tradukis V. Šilas*

# TRIGRADAJ ESPERANTO-KURSOJ



Stano Marček



Porkomencanta kurso kun S. Marček



Mikaelo Lineckij



B2 – nivela kurso kun M. Lineckij



Svetlana Smetanina



Leciono por progresantoj kun S. Smetanina

**Zamenhof**:

Raidi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo.
Kio estas lernita, ne estas perdita.
Homo lernas tutan vivon.
Ripetado estas la plej bona lernado.

La 9-an de julio la regiona gazeto "Utenos apskrities žinios" publikigis foton de BET-anoj legantaj nian gazeton "Heroldo de Utena" antaŭ la inaŭguro de BET-49. Kurte estis prezentita BET mem.

## FOLKLORA FESTO POR ESPERANTISTOJ

En ĉiuj litovaj urboj kaj urbetoj funkcias rondoj, kluboj de homoj, kiuj interesiĝas pri tradicia popola muziko kaj praktikas ĝin. Tiujn grupojn oni popolare nomas "folkloraj ensembloj". Iuj el tiuj ensembloj penas spertiĝi en tradicia plenumado. Iuj improvize penas krei "propran stilon". Penas trovi avangardan formon, proksimiĝi al ĵazo aŭ rokmuziko. Plej ofte pri tio okupiĝas junularo. Tamen la plej ŝatataj en Litovio estas tiuj ensembloj kiuj fidelas al tradicia popola muziko. Unu el tiaj ensembloj estas la ensemblo *Utauta*.

La 11-an de julio (ĵaŭde) en la Muzika lernejo por partoprenantoj de BET-49 koncertas la loka folklora ensemblo *Utauta*. Ĝi estis fondita en Utena en 1990. En la repertuaro de la ensemblo estas aŭtentikaj kantoj, dancoj, ludoj kaj melodioj de la Utena regiono. La ensemblo en sia repertuaro havas ritajn kaj ceremoniajn programojn por diversaj festoj: Pasko, Johanfesto, Karnavala Mardo, Pentekosto.

*Utauta* multe koncertas en la regiono, en Litovio kaj eksterlande, partoprenas en diversaj kantfestoj, kalendaraj festoj, folkloraj festivaloj ne nur en Litovio. Ĝi koncertis ankaŭ en Hungario, Ruslando, Italio, Francio, Turkio, Portugalio, Grekio, por litovaj komunumoj en Belorusio, Latvio kaj Pollando .

*Utauta* estas iniciatinto kaj ĉefa organizanto de la tutlanda festivalo de folkloraj ensembloj, kiu en Utena okazas dum la Litovia ŝtatfesto la 6-an de julio ekde 2008. Okazis ĝi ankaŭ ĉi-jare. La ensemblon gvidas Liuda Griciuvienė, la gvidanto de la popola blovmuzika orkestro estas Laimutis Kirilauskas.

Ni invitas ĉiujn al la koncerto de *Utauta*: venu kaj frandu litovajn popolajn folkloraĵojn.

## FABELAJ MONDOJ EN ESPERANTO

Partoprenantoj de BET-49 havas eblecon ĝui diversajn fabelajn interesaĵojn, kiuj estas kreataj de Anna Striganova. Ŝi kreis centojn da pupoj de diversaj fabelaj kaj mitologiaj estaĵoj, bildoj, kunaŭtoris du fabelajn librojn. Anna defendis disertacion pri mitologiaj arketipoj en literaturo kaj la fabelaj motivoj. Tio estas unu el la ĉefaj ŝiaj profesiaj okupoj. Atentu ĝin, ĉar ĉiuj artaĵoj estas unikaj kaj nevendeblaj. Ĉiutage en la vestiblo de klerigejo okazas ekspozicio de novkreitaj pupoj kaj desegnoj. La 11-an (ĵaŭde) je la 15.00 Anna faros prelegon "Lingvo de fabeloj", kiu estas bazita sur ŝiaj sciencaj esploroj ĉi-teme. Vendrede, la 12-an je la 14.00 okazos prezento de la projekto "Fabelaj mondoj", kiun kunkreas la duopo Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko. Ankaŭ nepre vizitu la retejon http://fabelo.trovu.com

## KOREKTO

Sur la 1-a paĝo 18 linio de Heroldo n-ro 4 anstataŭ 35 jaroj devas esti 55 jaroj. En 1958 do esperantistoj partoprenintoj de studenta Baltia kantfesto faris apartan kunvenon en Riga universitato.

**ATENTON: La lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj okazos nur dum la horoj 9.00–11.00**

ŜERCE AŬ IRONIE

### Malnova komencanto

Esperanton mi lernis antaŭ longe, ankoraŭ en pasinta jarcento. Kie mi lernis. Kiel mi lernis. Kiu min instruis – mi jam ne memoras. Jes mi lernis! Sed nenion mi ellernis. Oni diradis, ke Esperanto estas la plej facila kaj la plej logika lingvo en la mondo. Stange, la angla estas ne tiel facila kaj ne tre logika. Sed mi parolas la anglan. "Haŭ du ju du" kaj ankoraŭ iom. Sed neniu anglo nomas min krokodilo ... Kial mi parolu pri Esperanto? Tutegale mi ĝin ne ellernis. Malgraŭ tio mi sukcese partoprenis en kelkaj Universalaj Kongresoj de Esperanto. Tie mi ĉiam trovis kun kiu mi povas interparoli en mia nacia lingvo aŭ en la angla ... Ho memoro, memoro! Pri kio oni diskutis en Esperanto-kongresoj mi ne memoras. Nun mi sidas kaj atendas – eble mi ion rememoros. Mi sidas kaj sidas. Tuta vivo traflugis antaŭ miaj okuloj. Ion mi atendas. Kion mi atendas – mi ne plu memoras. Ho, mi rememoris: mi deziris diri al la prezidanto de UEA "bonan tagon", sed forgesis tiam kiel tion diri ... en la angla ...

### Vetera prognozo

Por la 11-a de julio (ĵaŭdo)

Iom ombraj sed senpluvaj mateno, tago, vespero. Temperaturo tage +20-22◦C

Por la 12-a de julio (vendredo)
Ombra mateno, pluva tago, vespero senpluva.
Temperaturo tage +20-22◦C

## GRAVA NOVAĴO

La 12-an de julio (vendrede) je la 8.30 el la Kolegia ejo okazos **rekta disendo por tuta Litovio pri BET-49**. La dissenda radiostacio estas „Laisvoji banga" (Libera ondo). Partoprenantojn de BET-49 paroligos ĵurnalisto **Audrys Antanaitis** (Prezidanto de TEĴA).

Verku kaj fotu por *HdeU* !
Redaktoro
Vytautas Šilas,
+370 611 75500
vilnastelo@yahoo.lt